

Kalembura kadro



La solvo por la lasta enigmo estas **“sem-estro”**.
Kaj jen la hodiaŭa enigmo: Ĉu vi scias, kial ĝirafo
neniam estas sola? Ĉar ĝi havas **L**- **N**!

Hodiaŭ je la 2-a: te-festo!

Ĉu plaĉas al vi teo? Ĉu vi volus gustumi novajn specojn?

Venu je la 2-a ptm al la ĉambraro de Jody (Asante #124). Ŝi afable preparos por ni diversajn specojn de teo, kaj ni ludos lotludon kiu nomiĝas “te-umil”



Senpaga skajpumado

Skajpo (angle: *Skype*) estas komputila telefon-programo kiu permesas al vi paroli senpage kun aliaj Skajp-uzantoj tra la Interreto. La programo estas senpage elŝutebla, kaj ĝi funkcias pli-malpli glate en Vindozo (*Microsoft Windows*), Makintoŝo (*Apple Macintosh*), kaj Linukso (*Linux*).

Lastatempe Skajpo fariĝas la plej vaste uzata tia programo en Esperantujo. La interfacon (ĉiujn mesaĝojn, menuojn, ktp) oni jam delonge tradukis en Esperanton, kaj en la programo mem “Esperanto” estas unu el la lingvoj per kiuj oni povas serĉi kunbabilontojn.



En la komuna salono vi trovos komputileton kiun ni kunportis precipe por helpi vin skajpumi kun aliaj Esperantistoj dum NASK. Konektitaj al ĝi estas eta kamerao (staranta sur la ekrano) kaj mikrofono. En la malsupra parto de la ekrano vi trovos fenestron kun “kontaktlisto” de kelkaj esperantistoj; simple klaku sur nomon tie por voki. Fojfoje vi eble aŭdos la komputilon tinti—tio signifas, ke iu vokas vin! Por akcepti, klaku sur la verdan piktogramon (bildeton) de telefono.

Ekde ĉi-vendredo komenciĝos du grandaj landaj kongresoj en Esperantujo: TAKE (en Montrealo, Kanado) kaj BKE (en Fortaleza, Brazilo). Ĉe ambaŭ eventoj oni starigos similajn komputilojn por “virtuale” renkontiĝi kun ni! Espereble ni havos ŝancon okazigi du-kontinentan ceremonion inter niaj tri grupoj.

Se vi volas uzi Skajpon en via propra komputilo por trovi kunbabilontojn en Esperantujo, iru al la jena *Yahoo*-grupo:

<http://groups.yahoo.com/group/skajpanoj/>

El la kalendaro...

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	hodiaŭ	merkredo	ĵaŭdo	vendredo
matene	klasoj	klasoj	klasoj	klasoj
post-tagmeze	2 ptm: tefesto kun Jody	2 ptm: Ekskurso al Monteto <i>Soledad</i>	2 ptm: trezorserĉado!	2 ptm: artpromeno kun Meja
vespere	<i>libera</i>	7 ptm: Bertilo prelegas pri la <i>Universala Vortaro</i>	<i>libera</i>	7 ptm: Festo ĉe la domo de D-ro David JORDAN

Prunteprenu el la NASK-biblioteketo

Krom la bibliotekoj de la Universitato kaj la Lingva Laboratorio, NASK havas malgrandan apartan kolekton de libroj. Jen preskaŭ kompleta listo. Se vi deziras legi aŭ uzi tiujn ĉi librojn, petu al unu el la instruistoj.

VORTAROJ

Plena Ilustrita Vortaro 2005

Butler:	<i>Esperanto-English</i>
Benson:	<i>English-Esperanto</i>
McLinen:	<i>English-Esperanto-English</i>
Wells:	<i>English-Esperanto-English</i>
E. Asocio de Britujo:	<i>Mini English-Esperanto/Esperanto-English Dictionary</i>

GRAMATIKOJ

Wennergren:	<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i>
Jordan:	<i>Being Colloquial in Esperanto</i>
Manner-Mamužić:	<i>Kompendio de la Esperanta Gramatiko</i>

LERNOLIBROJ

Richardson:	<i>Esperanto: Learning and Using the International Language</i>
Auld:	<i>Paŝoj al Plena Posedo, 3-a eldono</i>
Smidéliusz:	<i>Ĉu Vi Aŭdis ke...</i>
Gubbins:	<i>Subtekste</i> <i>Kunvojaĝu, 2-a eldono</i>
Childs-Mee:	<i>Saluton: Esperanto Aŭtodidakte</i>
Boulton:	<i>Faktoj kaj Fantazioj</i>
Piron:	<i>Vere aŭ Fantazie</i>
Marček:	<i>Esperanto Per Rekta Metodo (diverslingve)</i>

DIVERSAJ TITOLOJ

Manlibro pri Instruado de Esperanto

El Ĉina Poezio

Korĵenkov:

Samideanoj

Historio de Esperanto

Johansson:

La Krime de Katrina

Schwartz:

La Gaja Podio

La Stranga Butiko

Verdkata Testamento

Auld:

Nova Esperanta Krestomatio

Vereco Distro Stilo

Traduku!

Kulturo kaj Internacia Lingvo

75 Jaroj

La Fenomeno Esperanto

